

Radio Ĉerizo 4

2011-02-02

Radio Ĉerizo aŭdigas al vi hodiaŭ mallongan eseon, verkita de unu instruisto-profesoro por lerneja ĵurnalo, kio aperos en marto.

Mi kaj Esperanto

Kiam mi estis lernanto en elementa lernejo, mi legis kolumnon pri la elementa lerneĵano, kiu salutis esperante al fremduloj "Bonan tagon", en la tagĵurnalo por geknabinoj. Mi sentis envion kaj emociion kontraŭ li, kio fariĝis la kialon havi intereson al alilandaj lingvoj krom la japana.

Mi ŝparis mian monatan moneton, kaj fine aĉetis la lernolibron "Esperanto en Kvar Semajnoj", kaj komencis lerni per si mem.

Kiam mi estis la 2(du)a jarano de meza altlernejo, mi komencis lerni la francan lingvon per radioelsendo kun mia amiko, sed ne finlernis ĝin pro okupiteco de preparo por ekzamenoj.

Kiam mi estis universitata studento, mi agadis por la studenta organizo Rondo Harmonia, ĉesiginte membrecon de universitata orkestro, kaj fondis la Esperantorondon nomatan Cerva Rondo. Mi iris al multaj lokoj kaj amikiĝis kun la agantoj en Kioto, Avaĝi, Hukooko, Kumamoto, kaj tiel plu.

Kaj poste mi laboris en 6(ses)

lernejoj ĝis nun kiel instruisto. Laŭ lernejo mi ricevis honorajn titolojn, kiel folkloristo pro amo al muziko, komputilisto, korelingvisto, kaj aliaj, laŭ mia ŝato.

Nacia lingvo estas baza; sed por interkomunikiĝi kun alilandanoj, bona estas la lingvo, kio estas egala al ĉiuj, facile lernebla kaj uz-ebla. Esperanto estas la plej bona.

Antaŭjare kaj en ĉi tiu jaro, mi partoprenis al la esperantaj kunvenoj korea en Seulo, kaj azia en Mongolio. Pli ol 200(ducent) homoj en pli ol 20(dudek) landoj parolas la saman lingvon, kun mal-samaj vestoj kaj vizaĝoj. Tio donis al mi emociion. Ni povas esti ĝentila kontraŭ aliulaj misuzoj, ĉar ankaŭ ni lernis tion en klopodo. Mi aŭskultis paroladojn, prelegojn pri scienco kaj kulturo, vidis aŭkcion, kaj diris mian opinion en fakkunsido. Mi parolis kun koreaj kamaradoj samkiel longtempaj amikoj ankaŭ en la japana kongreso.

Mi volas, ke altlerneĵanoj lernu Esperanton, tre facilan pli ol la anglan. Mi jam komencis sonelsendadon por prezenti japanan kulturon al la mondo.

Fine mi montros al vi kelklingvajn salutojn "dankon."
Esper-ante: Koran dankon!
Turke: Teşekkür ederim.
Mongole: Ваярлалаа.(bajirllaa)

Fino de la eseo "Mi kaj Esperanto".

Radio Ĉerizo dankas por via
pacienca aŭskultado, kaj atendas
viajn voĉojn.

E-letero al -->
belmonto.azia@gmail.com